Johann Wolfgang von Goethe,

# Erlkönig

Wer reitet so spät durch Nacht und Wind?
Es ist der Vater mit seinem Kind;
Er hat den Knaben wohl in dem Arm,
Er fasst ihn sicher, er hält ihn warm.

Mein Sohn, was birgst du so bang dein Gesicht? —
Siehst, Vater, du den Erlkönig nicht?
Den Erlenkönig mit Kron' und Schweif? —
Mein Sohn, es ist ein Nebelstreif. —

„Du liebes Kind, komm, geh mit mir!
Gar schöne Spiele spiel' ich mit dir;
Manch' bunte Blumen sind an dem Strand,
Meine Mutter hat manch gülden Gewand.“ —

Mein Vater, mein Vater, und hörest du nicht,
Was Erlenkönig mir leise verspricht? —
Sei ruhig, bleibe ruhig, mein Kind;
In dürren Blättern säuselt der Wind. —

„Willst, feiner Knabe, du mit mir gehn?
Meine Töchter sollen dich warten schön;
Meine Töchter führen den nächtlichen Reihn
Und wiegen und tanzen und singen dich ein.“ —

Mein Vater, mein Vater, und siehst du nicht dort
Erlkönigs Töchter am düstern Ort? —
Mein Sohn, mein Sohn, ich seh' es genau:
Es scheinen die alten Weiden so grau. —

„Ich liebe dich, mich reizt deine schöne Gestalt;
Und bist du nicht willig, so brauch' ich Gewalt.“ —
Mein Vater, mein Vater, jetzt faßt er mich an!
Erlkönig hat mir ein Leids getan! —

Dem Vater grauset's; er reitet geschwind,
Er hält in Armen das ächzende Kind,
Erreicht den Hof mit Mühe und Not;
In seinen Armen das Kind war tot.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

# Elfreĝo

*tradukita de Joachim Gießner*

Rajdadas tra vent' kaj noktnebul'
la patro kun febranta etul'.
La knabon firmtenas sur sia sel'.
brakŝirmas lin varme sub mantel'.

"Ho fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'"?"
"Jen, patro, elforeĝ' en profund',
la elforeĝo kun kron' kaj trenaĵ'."
"Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'."

"Vi ĉarma knab', ho, venu nun,
ni kune ludos en bril' de lun'.
Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,
orajn vestojn havas mia patrin'."

"Ho patro, ho patro, ĉu aŭdas ne vi?
L'elfreĝo dolĉe promesas al mi."
"Karulo, trankviliĝu, infan',
susuras vento tra seka kan'."

"Vi, ĉarma knab', akompanu min,
la filinoj vartos, dorlotos vin.
La filinoj dancos en nokta rondad',
vin lulos kaj kantos por via dormad"'.

"Ho patro, ho patro," ĝemegas la fil',
"elfinoj jen kun obskura bril'!"
"Filet', filet', ekkonas mi ĝin,
salikoj la grizaj trompas nur vin."

"Mi amas vin, allogas min via belec',
kaj se vi ne volas, vin venkos fortec'!"
"Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin!
Elfreĝo krude perfortas min."

Rapid-horora la patra rajdad' -
en brak' aŭdiĝas singulta ĝemad'.
Kun pen' li venas ĝis la kort',
prenita estas la knab' - de l'mort'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-588-1185 (2013-02-26 14:59:44)*

*Pri la verkinto vidu la retejon* http://de.wikipedia.orgwikiJohann_Wolfgang_von_Goethe*, pri la tradukinto la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski*. Pri la balado vidu:* http://de.wikipedia.org/wiki/ErlkГynig_(Ballade)*. La muzikon, kiun verkis la germana komponisto Franz Schubert, oni povas aŭdi en la reta video* http://www.youtube.com/watch?v=e40Mm8baD7A*. Pri la komponisto informiĝu en* http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Schubert-

*Traduko de la Germana poemo "Erlkönig" de* Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-588-1242 (2012-10-18 16:09:46)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html*. sub* http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf*.*